

Renovigo de la skandinava komunumo

AMO 69

kadre de virtuala
kunsido kunvokita de
la Norvega
Esperantista Ligo,
novembro 21, 2020



Stefan
MacGill



Historio: Persona elekto

- Pioniraj kluboj kaj organizoj: Eo-klubo en Uppsala 1891, la dua en la mondo.
- Asocioj sveda 1906, (por UEA 1933), finna 1907, 1955, dana 1908, 1933, norvega 1911, 1933
- Julio 1915, Zamenhof tra Svedio devis reiri al Varsovio post nuligo de la UK en Parizo
- La unua skandinava UK: Helsinko 1922, la dua en Stokholmo en 1934 -- la lasta en 2019 (Lahtio)
- Elstara rolo en la finna eduka sistemo; aktiva engaĝigo de Ivo Lapenna en la 50aj jaroj
- Principaro de Frostavallen (Svedio), modernigo de informado, 1956 vidu la sekvan bildon.

Lapenna en Frostavallen



Ripozo
inter la
laborsesioj
pri
modernigo
de la
informado



FLAM-analizeteto

- **Fortoj:** Eo-oficejo en Oslo, eble en Rejkjavik. Eo-Centro en Lesjöfors. Fizikaj revuoj en Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Danlando.
- **Malfortoj:** Generacia malekvilibro de membroj.
- **Avantaĝoj:** Fortaj sanservo kaj infrastrukturo, alta vivnivelo, retaliro kaj vojaĝemo.
- **Minacoj:** La vasta uzado de la angla por internacia komunikado.



La historio de AMO en Skandinavio

- **AMO 11** en Uppsala, Svedio pri informado. Majo 2015
- **AMO 24** en Odense, Danlando (kreis FLAM-analizon kaj rekomendojn; vidu la foton). Aprilo 2016
- **AMO 69** en Oslo, Norvegio pri la skandinava movado





AMO 11 en Uppsala, 2015



Kungvidis: Stella Lindblom, sperta pri publika komunikado



Pluen al TEJO kaj ILEI

- Jam estas prezentitaj la laboroj de la landaj Asocioj de UEA. Mi ne ripetos tion, do ni pluis al la roloj de TEJO kaj ILEI.
- Ja okazis Nordiaj kongresoj, la unua en Gotenburgo en 1918, kun centjara festado surboate inter Kopenhago kaj Oslo en 2018.



La historio de TEJO en Nordio

- **Lanĉo de sekcioj:** Ekzistis sekcioj en ĉiuj skandinavaj landoj krom Islando kaj la Ferooj.
- **Junularaj Kongresoj:** 1952 en Ry, Danlando, 1962; Ystad, Svedio; 1969 Tyresö (Svedio); 1975 Fredericia, Danio; 1980 (Rauma); 1991 Karlskoga (Svedio), 2003.
- **Monde konataj iniciatoj:** Deklaracio de Tyresö (1969 – socia aktivado), Manifesto de Rauma (1980) pri desubismo kaj desuprismo.
- Redaktoroj de 'Kontakto' tra kelkaj jaroj loĝis en Finnlando.
- Nordiaj junularoj kunlaboris ekde 1985 per la komuna revuo 'Kvinpinto'.



La rolo de TEJO

- o **Svedio**: SEJU ne plu funkcias kiel organizo, sed junuloj kontaktas unu la alian.
- o **Norvegio**: NJE plie ekzistas, sed ne tro forte agadas. Havas retejon, sed malaktualan (2012)
- o **Finnlando**: Ĉu FEJO plue ekzistas? Eks-retejo.
- o **Danlando**: Kredeble plie ekzistas – havas bonan kaj aktualan retejon.

Ĉu la vojo antaŭen la restarigo de sekcioj de TEJO aŭ landaj organizoj, kiuj kapablas kaj strebas allogi junulojn? Aŭ strukturo ne laŭlanda?



Retejoj de DEJO kaj NJE

DEJO

Hejmo Novaĵoj Okazaĵoj Aliĝi Pri ni Kontakti

Informplena, dulingva kaj laste modifita: 2019



Norvega Junularo Esperantista
Norsk esperantoungdom

Frontpaĝo

Pri NJE

Esperanto?

Aranĝoj

Inter ni dirite

Pondus

Novaĵoj

Ligiloj

Pondusarĥivo

Bonvenon al Norvega Junularo Esperantista!

Laste modifita: 2012



La trilingva retejo de FEJO



[Esittely suomeksi](#)

En Esperanto

[Presentation på svenska](#)

[Kontaktinformoj de la estraro](#)

FEJO - Finnlanda Esperantista Junulara Organizo

Nia asocio estas fondita jare 1977 kaj en la statuto ĝia celo estas difinite:

- (1) disvastigi uzon de internacia lingvo Esperanto inter junularo,
- (2) funkcii interligilo por junaj esperantistoj en Finnlando,
- (3) uzi Esperanton por avantaĝo de junularo.

FEJO estas membroasocio de [Esperanto-asocio de Finnlando \(EAF\)](#) kaj landa sekcio de [Tutmonda Esperanta Junulara \(TEJO\)](#). FEJO havas ordinarajn membrojn (sub 30-jarulaj), subtenantajn membrojn kaj membroasociojn.

Membroasocioj de FEJO estas...



Esperanto en Universitato de Helsinki



Junularo Esperanta en Helsinki



La **Dishejo** de FEJO peras muzikon (paĝaro nur en la finna lingvo)



Pritakso de la retejoj

- SEJU kredeble ne havas retejon – se jes, TEJO mem ne konscias pri tio. Eventuale la organizo nur nur dormas kaj estos revivigebla kiam maturas la ebloj.
- Nur la dana retejo aktualas.
- Tiu de NJE laste modifita en 2012. La baza retadreso ne funkcias, trovebla nur tra la retejo de NEL.
- Tiu de FEJO laste modifita en 2010, la tri subligoj laste modifitaj en 2006 (du) kaj 2004 (unu).



Ret-etiketo

- Retpagoj estas montrofenestro al la mondo. Ili gravas eĉ se la membroj komunikas inter si pli ofte per *Twitter*, *Facebook*, aŭ alia.
- Starigi retpaĝojn simplas. La timiga parto estas teni ilin aktualaj. Aperu la nomo kaj retadreso de la paĝ-prizorganto
- Retpaĝoj montru la daton de lasta modifo.
- Al anoncoj pri aranĝoj, ĉiam aldonu la jaron!
- Asocioj regule testu la alirojn de siaj retejoj.
- Asocioj kontrolu, kiom serĉado per bazaj ŝlosilvortoj gvidas al la retejo.



ILEI - la nordia historio

- o Finnlando ludis pioniran rolon en la fondo de ILEI mem. Sylvia Hämäläinen zorge dokumentis tiujn jarojn, kaj disponigis grandiozajn leterojn el la fruaj 50aj jaroj, kiujn ILEI zorge arĥivis. Dum multaj jaroj Eo-instruado okazis en la komunum-kolegio en Karlskoga.
- o ILEI-kongresoj: La 3a Konferenco de ILEI en Helsinko en 1969, kadre de la UK, la 9a en Humlebaek (DK), la 19a en Kungälv, la 25a en Voss (NO), la 29a en Övik, (FI), la 36a en Öresund (SE – kunlabore kun TEJO), la 44a en Kopenhago kun universitat-nivela simpozio
- o Dokumentoj: La Proklamo de Voss, 1991. Celo montri, ke kunviva vojo ekzistas inter desuprismo kaj la malo. La Konferenca temo: 'Tyresö, Rauma, kaj nun?'



La rolo de ILEI

- Ni komprenas, ke la finna ILEI-sekcio baldaŭ fermos sin. Kiomgrade funkcias la sekcioj en Svedio kaj Norvegio? La dana sekcio funkcias. En Islando estas kontaktpersono, sed neniuj sekcio.
- Ĉu ILEI povos ligi sin al la eta movado por subteni la instruadon, agadon kaj apogon de skandinavaj lingvoj kaj lingva egalrajteco?
- Norvegio: la norvega plejparte uzata por la kiel instrulingvo, rapida kresko de anglalingvaj kursoj je magistra nivelo. 40% de magistras tezoj anglalingvaj
- Danlando (2011): “Kial vi publikigis vian disertacion en la angla?” “Ĉar mi volas atingi legantojn!”



Alia faka agado

- ◉ Martinus agadas de jardekoj ĝis la nuno el Danlando.
- ◉ IFEF havas aktivan sekcion en Danlando. Iam estis Eo-isto en fervoja muzeo en Norvegio.
- ◉ Nenio konata pri UMEA.
- ◉ Nenio konata pri AVE (ekologoj) – natura fako por Skandinavio.
- ◉ LIBE agas en Norvegio kaj Finnlando.



Vojoj antaŭen

- Pli intensa kursaro konvena por junuloj – reta kaj fizika
- Kontinua vidigo de Esperanto kiel vivanta lingvo
- Sendado de instruistoj al trejnkursoj
- Pli forta konigo pri retaj trejnebloj - <edukado.net>
- Pli plena uzado de fakaj iniciatoj
- Pli forta kunlaboro inter la landaj asocioj
- Subteno al Islando refunkciigi sian sektion
- Postpandemie – kreu nordian kunvenon kia estas la slovacia SES, serve al Duoling-anoj kaj similaj
- Postpandemie – spiru novan vivon en KEF – esence Nordia kultura fenomeno



Fontoj kaj pliaj studebloj

- Jarlibro de UEA 2018 (la lasta)
- Landa Parad' pri Eŭropo (ĝisdata ĝis okt 2020) alirebla en <aktivulo.net>
- Rekomendoj de la 24a Seminario de Aktivula Maturigo (AMO) en Odense, Danlando.
- Nuna stato de la TEJO-sekcioj en Eŭropo